

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Francalandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 25 fkoj
Bonfara : 30 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

JANUARO-FEBRUARO

1976 1

KULTURAJ KAJEROJ

1976 JANUARO - FEBRUARO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

9a R.I.D.E.F. J. Marin

Apolono - lia rolo (fino)

Prelegoj de Grésillon

Pri francaj virinoj en industria sektoro B. Cheverry

Vintrodormado

Harfajnaj radiketoj G. Illyes

Por via distro.

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

El Grésillon

La programo de la someraj aktivaĵoj preciziĝas. La unua, julia, periodo ĝemele similos la unuan periodon de la autaŭaj jaroj kun siaj tri Esperanto-kursoj kaj finaj ekzamenoj por la interesatoj. La samaj manartoj estos praktikeblaj inkluzive de foto-arto. Dum la lastaj du semajnoj de tiu periodo la ĉeestantaj instruistoj havos specialajn kunvenojn por prepari la agadon por-kaj per-esperantan en la Internacia Renkontiĝo de « Moderna Lernejo » - instruistoj, kiu okazos fine de la monato julio, en Pollando. Jam, en Februaro, kvardeko da aliĝoj alvenis. Do venu multnombraj, amikoj el ekterlando tiamaniere ke la aktivaĵoj, inkluzive de la kursoj, estos vere internaciaj, ankoraŭ pli ol la du antaŭajn jarojn.

Dum la dua periodo, laŭ la tradicio, la ĉeestantoj povos aŭskulti tre interesajn prelegojn. La prelegantoj de Grésillon ne estas (ankoraŭ ne !) mondskale konataj sed la diskutoj, kiuj okazas tuj post la prelegoj aŭ posttagmeze montras, ke ĉiuj alportas ion novan al la ĉeestantaro, pliriĉigas iliajn konojn en etoso neformala. Ĉijare, kiel anoncite, okazos kurso por komencantoj diversnaciaj. La tria periodo multe similos la unuan.

La programo ne multe ŝanĝiĝis. Ĉu ankaŭ la kastelo ? La ŝanĝoj estas tie pli grandaj. Nova paŝo al finmodernigo de la ĉambroj estas nuntempe irata sur la unua etaĝo : kvar ĉambroj estas tute refarataj kaj kvin novaj ĉambroj ricevos varman akvon. La ĝenerala elektra sistemo de la unua etaĝo estas renovigata.

Dank'al kelkaj donacoj ni povis aĉeti kvardek pliajn faldeblajn seĝojn por la granda salono kaj la kurso-ĉambroj. Ni esperas, ke la someraj vizitantoj povos sidi en tute preta prelegsalono. Kondiĉe ke ili tre rapide aliĝu !

Esperanto tra la Mondo ★

La Universala Kongreso en Ateno

— La ĉeftemo de la Universala Kongreso estos : « Internacia kunlaborado de ŝtatoj je regiona nivelo ». Krome, la kongreso traktos movadan temon : « Kiel nuntempe argumenti por Esperanto ? ».

— Belaj ekskursoj estas preparitaj : duontagaj ekskursoj tra Ateno kaj ankaŭ al la kabo Sumion, tuttagaj ekskursoj celos al Delfi, aŭ Argolis, kaj per ŝipo al la pli proksimaj insuloj.

— « Ambiciaj » planoj estas faritaj por antaŭ — kaj post — kongresaj ekskursoj.

La inaŭguro kaj malfermo de la kongreso okazos en la ĉefa salono de la impona hotelo Hilton, tute el marmoro, fronte al Akropolo.

— La Esperanto-grupo de Bari (Italujo) organizos renkontiĝon por ĉiuj, kiuj veturos tra la urbo, survoje al la kongreso. Adreso : SIT, Agenzia di Bari Corso Cavour 48, I-70121 Bari.

— Esperanto-aŭtoralio inter Vieno kaj Ateno (24 — 31a de Julio). Adreso : « Monda Turismo » Stiegerg 6/22, A-1150 Wien.

La Junulara Kongreso en Tesaloniko

La Internacia Junulara Kongreso okazos tuj antaŭ la universala, en Tesaloniko, de la 24a ĝis la 31a de Julio, en la studenta domo ; la temo estos : « Lingvo kaj socio ». Adreso : IJK 1976, ĉe Helena Esperanto-Asocio, Agiu Meletiu 54, Ateno 805, Greklando. Oni ankaŭ povas peti la aliĝilon en UEA Roterdamo — 3002, Nieuwe-Binnenweg 176.

La Kongreso de S.A.T.

La ekskursoj de la kongreso de Sennacia Asocio Tutmonda, kiu okazos en Gotenburgo (24-30a de Julio), celos nordan Danion kaj la arkipelagon, norde de Gotenburgo. Kunveno okazos kun la lokaj sindikatoj. Adreso de SAT : 67, avenue Gambetta, 75020 Paris (Francio).

Por enkonduki Esperanton en komerco kaj industrio

— Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio (EKI) alvokas la esperantistojn kiuj havas rilatojn kun komercaj kaj industriaj entreprenoj, utiligi tiujn rilatojn por instigi la produktantojn meti sur la varoj, ne nur nacilingvajn sed ankaŭ esperantlingvajn tekstojn por varnomo kaj uzinformo. Oni povas informiĝi ĉe EKI-oficejo, pk 440, S-718 Grailsheim, FRG.

— S-ro J. Briscoe, 19 Moorland Road, Starbeck Harrogate HG 2 7HD, Yorks, Anglujo, deziras trovi bonvolemajn kunlaborantojn por kontroli la plurlingvajn tradukojn de « instrukcioj por uzo » de varoj aŭ aparatoj kaj, poste, atentigi la fabrikantojn pri eventualaj eraroj, kaj... utileco de Esperanto.

La Someraj Universitataj Kursoj 1976

La tria sesio de SUK (Someraj Universitataj Kursoj) okazos inter la 8a kaj la 29a de Aŭgusto, en la Universitato de Antverpeno, Belgio. Oni povas partopreni unu, du aŭ tri semajnojn. La altnivelaj prelegoj koncernos, tiujare, la tri jenajn fakojn : biologio, matematiko, sociologio, kun la partopreno de universitataj profesoroj de 7 landoj. Informojn : Someraj Universitataj Kursoj, Boite postale 9, B-4000 Liège 3 (Belgujo).

Restadoj por esperantistoj en G.D.R. kaj Bulgario

La Esperantista Federacio de Laboro, en Francio, proponas restadojn en Bulgario kaj Germana Demokratia Respubliko, kun renkonto de esperantistoj. Adreso : S-ro W. Gilbert, 30, rue Croix-Montoire, F-37100 Tours (Francio).

Renkonto en Eindhoven dum Pasko

La Eŭropa Esperanto-kongreso arigos en Eindhoven, de la 16a ĝis la 19a de Aprilo, partoprenantojn el deko da landoj ; kunvenoj en la Kultura Centro de Philips (POC). Adreso : Esperanto-kongreso, Floraplein 23, Eindhoven (Nederlando).

Okaze de la Olimpikoj, en Montrealo

En Julio okazos la Olimpikoj en Montrealo. Pro tio, la Kanada Esperanto-Asocio reeldonos la libreton de S-ro Ralph Harry : « Saluton, Amiko », aldonante la francan tradukon kaj lokon por aliaj tradukoj. En akompana letero, la iniciatintoj proponos al 9 000 atletoj senpagan lernolibron kaj diskon pri la internacia lingvo.

Krome, la loka olimpika komitato petis liston de esperantistoj, kiuj konas ankaŭ la francan aŭ la anglan, kaj se eble, aliajn lingvojn (kandidatoj inter 20 kaj 35 jaroj prefereble).

Ĉu vi konas tiujn du gazetojn ?

— « Literatura Foiro » ; ĝi estas dumonata literatura gazeto, eldonita en Italujo. Tutjara abono : 12 nederlandaj guldenoj.

— « La Migranto » ; ligilo de la esperantistaj naturamikoj, eldonata kun aprobo de la Naturamika Internacio (populara turisma asocio). Jarabono : 7 gld. Provekzemplero havebla kontraŭ 3 int. rkp. ĉefredaktoro : Cor Bruins, Wilhelminapark 24, Oegstgeest, Nederlando.

Por informi pri Esperanto...

— En Francujo, en ligiteco kun la propono de leĝo pri Esperanto farita en la ĉambro de deputitoj, « Unuiĝo Franca por Esperanto » (UFE), sendis informan broĉuron al la parlamentanoj.

— Germana Esperanto-Asocio disdonis varbilon en eldon-kvanto de 100 000 ekzempleroj.

— Speciala numero de la svedlingva gazeto « Esperanto-nytt » aperis grandformate en 52 000 ekzempleroj.

— En Tokio, en unu el la plej grandaj eldonejoj, aperis japanlingva traduko de la libro : « la danĝera lingvo » de U. Lins, en 50 000 ekzempleroj.

— En Tokio ankaŭ, de la 9a vespere ĝis la 9a matene, tokia telefonservo aŭtomate informas pri esperanto — aktualaĵoj.

— 6-paĝa priskribo pri Esperanto aperis, 55 000 ekzemplere, en la nova jarlibro de la hungara revuo « Füles ».

Grava evento en Pollando, dum aûgusto : 9a RIDEF

internacia renkontiĝo de geinstruistoj praktikantaj Freinet - Teknikojn

KIO ESTAS TIUJ FREINET-TEKNIKOJ ?...

Por trafe taksi kaj kompreni la Freinet-pedagogion necesas iom scii pri la vivo de Freinet, ties elpensinto.

KIU ESTIS FREINET ?

Freinet naskiĝis en 1896, en malriĉa Provencia familio. En 1917, novbakita instruisto li estas ĵetita en la ŝtormon de la unua mondmilito ; gravege pulmvundite li preskaŭ mortas. Pli malpli resaniginte li tamen ricevas postenon en 1920 ĉe elementa lernejo. Sed li malfacile eltenas instrulaboron, kiu postulas longajn paroladojn, pro sia limigita spirpovo. Multe leginte el verkaĵoj de famkonataj pedagogoj, kiaj Maria Montessori, Dewey, Decroly, Makarenko, li sopiras al pli natura kaj racia instrumetodo ; li antaŭsentas, ke infanoj posedas en si mem nemezureblan potencialon.

Tiam prezentiĝas favora okazo por vere motivita laboro : kolektiva redaktado de la unua libertema verkaĵo (la helik-vetkurado), tuj post la evento, en granda entuziasmo. Vivo ĵus eniris la klasĉambron ! kaj ne plu eliros. Sinsekve Freinet enkondukas, krom libertemaj verkaĵoj, enketojn, memesplorajn taskojn kun raportoj, klasgazeton, korespondadon...

1924 : unua interŝanĝo kun gelernantoj en Bretonio.

1926 : unua metiista presilo, el ligno, kiu ebligas aperigon de la unua presita lerneja gazeto.

1928 : Ĉar rapide multnombriĝas la rondo da disĉiploj, kaj por fabriki kaj distribuadi la ilojn de tiuj bezonatajn : kreado de la C.E.L.

C.E.L. : (Coopérative de l'Enseignement Laïque) : Kooperativo por Laika Instruado. Nun ĝi eldonas ĉiujn revuojn kaj fabrikas ĉiujn ilojn ellaboritajn de la diversaj laborkomisionoj, kaj de laborantaj gelernantoj el ĉirkaŭ 20 000 klasoj de l'I.C.E.M. (interaliaj : B.T. « Bibliothèque de Travail » (laborbroŝuro) ; B.T.J. por elementaj lernejoj ; B.T. 2 por duagradaj ; B.T.R. por esplorlaboro ; aŭdvidaj B.T. ; kaj revuoj « L'Educateur », « l'Art Enfantin » (infana arto), k.t.p...).

Sed ege malplaĉas al la reganta burĝaro tiu pedagogia metodo, kiu estas esence popola kaj celas al edukado de ĉiuj infanoj sen ia ajn diskriminacio, por ke ankaŭ la malriĉuloj fariĝu homoj konsciaj pri sia digneco. Freinet tial ricevas gravan baton de la lokaj burĝoj, kiuj sukcesas atingi al lia eksigo. Ne plu povante instruadi en oficiala lernejo, Freinet mem konstruadas privatan en Vence, en kiu li tute libere povos eksperimenti siajn teknikojn.

1939 : denove tutmonda sanga ŝtormego. Freinet enkarcerigita pro siaj ideoj ; iom poste liberigita, sed sub streĉaj kondiĉoj. Lernejo en Vence fermita. Fuĝado ; militrezistado en Alpoj...

En 1947, la lernejo en Vence denove malfermiĝas. Laŭ vojo pli malpli glata la afero progresas : kongresoj ĉiujare arigas geinstruistojn pli kaj pli multnombrajn. Modernaj Freinet - teknikoj eĉ tutmonde disvastiĝas ; tial en 1964 naskiĝas la F.I. M.E.M.

F.I.M.E.M. signifas : « Fédération Internationale des Mouvements d'Ecole Moderne », Esperantlingve : « Internacia Federacio de la Movadoj pri Moderna Lernejo », kaj radias al 38 landoj. Ĝia bulteno estas « La Ligilo » (le lien).

La franca sekcio de F.I.M.E.M. estas I.C.E.M.

I.C.E.M. : (Institut Coopératif de l'Ecole Moderne) : Koopera Instituto pri Moderna Lernado. Ĝi strukturiĝas el distriktaj grupoj, laborkomisionoj ; eldonas du bultenojn : « L'Éducateur (la Edukisto) » kaj « La Brèche (la Breĉo) », kaj dekon da diversaj revuoj por infanoj, adoleskantoj kaj adoltoj.

Malfeliĉe, la 8an de oktobro 1966 mortis tiu altvalora homo, kiu forkonsumis ĉiujn siajn fortojn cele al starigo de vere popola edukado.

Tamen postvivadas lia giganta verkaĵo... Pri tio atestas interalie la vivoplenaj renkontiĝoj okaze de R.I.D.E.F.

BAZAJ IDEOJ DE LA FREINET-PEDAGOGIO :

— Edukado celas plenan disvolviĝon de la individuo, sed ne ties dresadon, nek submetiĝon, ankaŭ nek akumuligon de sciado en lia cerbo.

— Forpelata ja estas ĉia endoktrinigo aŭ endogmigo. La infano fariĝu estontece kapabla respondeculo en socio morgaŭa, el kiu malaperu milito, rasismo, diversspeca diskriminacio, ekspluatado de homo fare de homo.

— Nur la vivo plenefike instruas homon ; por akiri ĝiajn sciigojn ni sekvu naturajn vojojn.

— Freinet konvinkiĝis, ke ĉia mensa akiraĵo efektiviĝas per propra esploreksperimentado.

— Vera kaj profunda edukado fontas el laboro, sed el laboro motivita kaj libere elektita ; nu, lernotaj temoj nepre devenu de la infanoj mem.

— Konsiderante, ke esprimdeziro, impeta emo al komunikado kaj agado, estas nepraj kaj esencaj bezonoj, ĉe infano, ni ebligu al tiu ĉi kreivan laboron.

— La infano trovu en lernejo fidoplenan etoson, kompreneman medion kun libere akceptita disciplino.

— Lernejo iĝu esence popola, kaj plej altgrade emancipanta tiel por la geinstruistoj, kiel por la gelernantoj.

LA F.I.M.E.M. KREIS, laŭbezone, DIVERSAJN INTERNACIAJN RENKONTIĜOJN :

S.I.M. : (Stage International Méditerranéen) : Internacia staĝo por Mediteraneaj landanoj.
S.I.N. : Stage International des pays Nordiques : Internacia Staĝo por Nord-landanoj.

R.I.D.E.F. : (Rencontre Internationale des Educateurs Freinet) signifas : « Internacia Renkontiĝo de Geinstruistoj instruantaj laŭ Freinet-pedagogio ». En R.I.D.E.F. ariĝas ne nur geinstruistoj, sed ankaŭ pedagogiaj serĉantoj, studentoj, kaj simpatiantoj kun la Freinet-pedagogio, por pliprofundigo de pedagogiaj scioj, kaj ankaŭ por interŝanĝoj de ideoj kaj eksperimentrezultoj.

Ĝi aparte celas :

— Obligi informadon pri stato de la Freinet-pedagogio kaj de la progresemaj pedagogioj en diversaj landoj.

— Faciligi diversfacetan malkovron de la akceptlando.

— Eksperimentadi por daŭra formado de la instru-edukistoj per skipa laborado okaze de aktivaj faraĵoj en esplorado, kreativo kaj komunikado.

La tiujara, en Pollando, estos la 9a. La aliaj okazis en Belgio (1968) — Italio (1969) — Bratislava, Ĉeĥoslovakio (1970) — Beyrouth, Libano (1971) — Hillroed, Danio (1972) — Carthage, Tunizio (1973) — Edimburg, Britio (1974) — Tlemcen, Alĝerio (1975).

EN R.I.D.E.F. ESPERANTO DEVUS ESTI KOMUNIKILO !

« La Freinet-pedagogio ne povas esti alia ol INTERNACIA. Tiu internacieco estas ne nur moto, sed ĝi estas ankaŭ nepra neceso. Ĝi estas bazo de paco ». (El la Ĉarto de Moderna Edukado — Freinet-teknikoj).

La R.I.D.E.F.-oj estas internaciaj ; sed pro tio mem ofte estiĝas malfacilaĵoj pro lingvo. Tiujare, en la patrolando de Zamenhof, kelkaj laborkomisionoj — kiel iam unu en Hillroed (Danio) — uzos Esperanton en siaj debatoj, kiel oficialan lingvon. Krom tio, inter la diverslandaj geinstruistoj, kaj ĉefe kun la Pollandaj, interplektiĝos amikecaj rektaj kontaktoj, kies fruktodonecon tute ne bezonas emfazi.

ESPERANTISTAJ GEINSTRUISTOJ DE LA TUTA MONDO PARTOPRENU KIEL EBLE PLEJ MULTNOMBRE !

ANTAŬ - R.I.D.E.F. EN GRESILLON (Francio) :

Kiuj deziras perfektiĝi en Esperanto-praktikado kaj tiele prepari sian partoprenon en la Varsovia R.I.D.E.F., tiuj ĉeestadu la trisemajnan studperiodon, dum kiu la I.C.E.M.-esperantistoj havos specialajn aktivaĵojn, en la Esperantista Kulturdomo en Grésillon (49150 Baugé, Francio), de la 12a ĝis la 22a de julio 1976. Por informado, sin turni al : Edmond Plutniak, 1, place de la Mairie, Bavincourt - 62158 L'Arbret - Francio, por aliĝo al M.C.E. Grésillon 49150 Baugé.

ALIĜO AL LA R.I.D.E.F. EN POLLANDO :

Ĝi okazos en Plock, proksime al Varsovio, de la 2a ĝis la 16a de aŭgusto 1976. Ĝi estos organizita laŭ principoj de koopera kunvivado en ĉiuj siaj diversaj flankoj (laborplanado, distribuado de lokuzado kaj materialoj, kunsidanimado, vizitoj, enketoj, ktp.). Ĉiu partoprenos en animado kaj organizado.

La gekolegoj, kiuj ne jam scias pri R.I.D.E.F., tiuj trovos tie unikan okazon por ĝin ekkoni, kaj ankaŭ por plenumadi tri agojn egalvalorajn :

1 — Malsupraĵe malkovri Pollandon helpe de Polaj samideanoj.
2 — Praktiki Freinet-pedagogion, kiel plenaĝuloj, per uzado de ties fundamentaj teknikoj, kio konsistigas plej bonan inicion.
3 — Praktike kaj intense uzi Esperanton dum efektiva studperiodo, cele al efika lingva perfektiĝo.

NE ELLASU TIUN OKAZON !...

Nepre necesas scii plej eble frue pri la nombro de geesperantistoj (eĉ komencantoj), kiuj partoprenos en tiu renkonto.

Pro tio, la interesatoj bonvolu senprokraste sendi la ĉi-malsupran aliĝilon, eltondita kaj konvene plenskribita, al adreso jena : Jean Marin, 9, rue Adrien-Lejeune — 93170 Bagnolet - Francio. (Eblas ankaŭ sendi aliĝilon per aparta paperfolio laŭ la ĉi-malsupra modelo).

ALIĜILO

S-ro, S-ino, F-ino NOMO :

ANTAŬNOMO :

Kompleta ADRESO :

Telefon - N° :

Nivelo de Esperanto-scipovo :

ALTA -MEZA - MALALTA

intencas partopreni en R.I.D.E.F. 1976 en Pollando.

Rimarkoj, demandoj, sugestoj :

Dato : Subskribo :

(Resendenda kiel eble plej frue al : **Jean Marin**, 9, rue Adrien-Lejeune — 93170 Bagnolet - Francio)

APOLONO - LIA ROLO

Apolono estas unue mito aŭ legendo, kiu povas suprizi. Sed tiu legendo reprezentas religian koncepton tre altan, tre purigitan, tre stilizitan ; ia antikvaj tekstoj montras Apolonon vera Dio helpema al la homoj kaj aminda. En la klasika periodo, oni konsideris, ke muziko, poezio, filozofio, astronomio, matematikoj kaj aliaj sciencoj, estis sub lia kontrolo. En la tuta Grekujo oni konstruis templojn honore al li. Sparto precipe kultis lin. En sia « Respubliko » Platono skribas : « Estas Apolono, dio de Delfo, kiu devas dikti la plej gravajn, la plej belajn, la unuajn el la leĝoj... tiujn, kiuj rilatas la konstruon de la temploj, la oferbuĉojn kaj ĝenerale la kulton de la dioj, de la demonoj, de la herooj kaj ankaŭ la tombojn de la mortintoj, la honorojn laŭ kiuj oni devas ilin honori, por ke ili estu al ni favoraj ».

Apolono, Dio de la Lumo

Apolono estas bela ; lia vizaĝo radias de lumo ; li estas suna dio. Kiel la suno li estas bonfara kaj malbonfara. Bonfara ĉar li prezidas ĝermadon kaj maturiĝadon de la vegetaloj kaj li povas kuraci la malsanulojn. Cetere ne nur la korpojn li povas resanigi, sed ankaŭ li lavas la makulon de krimo, kondiĉe ke la kulpulo venu al Delfo kun pentanta koro. Malbonfara, detruanto de la musoj kaj de la akridoj, kiuj manĝas la rikoltojn ; liaj sagoj mortfrapas, eĉ alportas peston ĉe la malamiko.

Apolono igis Delfon Granda Religia Centro

La Pitio - La orakolo

Al la murmuroj de la arboj, de la akvoj, Apolono preferis la profetaĵojn de la Pitio. Unue ŝi estis junulino, poste 50-jarulino ; tute neriproĉebla ŝi vivis en la templo. Antaŭ la orakolo oni oferbuĉis kaprinon aŭ alian beston (homon en la unuaj tempoj). La Pitio puriĝis en la fontano Kastalio ; ŝi sidiĝis sur tripiedo, apud la omfalos ; ŝi maĉis laŭrfoliojn, halucinigajn ; ŝiaj paroloj, pli malpli koheraj, estis inspiritaj de la dio kaj interpretitaj de la pastroj por la konsultantoj, kiuj venis milope el la tuta Grekujo.

Apolono intervenis en la individua vivo

En Delfo, pli ol ĉie aliloke, Apolono havis pacigan rolon. La unua li enigis la nocion de Peko kaj Pentofero. Kontraŭe al la ideo de senfina puno, kiu frapis la kulpulon kaj liajn posteulojn (kiel ĉe la Atridoj de Miceno), Apolono enigis la ideon de pardono, de absolvo, kondiĉe ke oni venu al Delfo kun pura koro kaj ke oni akceptu memvolan punon ; li mem estis akceptinta punon post la morto de Pitono kaj la morto de la Ciklopoj ; dum kelka tempo li vivis meze de la homoj, humile plenumante iliajn homajn laborojn.

Heracles, en freneza krizo estis mortiginta siajn infanojn ; en Delfo li petas pardonon de la dio kaj akceptas la 12 laborojn. Oreste mortigis sian murdintan patrinon Klitemnestra ; postkurita de la Erinioj, li alvenas al Delfo. Apolono sendas lin al Ateno, kie la Areopago absolvas lin.

Eĉ, Delfo konsilis eviti pekon per sinregado kaj modereco en ĉio. En la « pronaos » de la templo Pausanias Plutarque notis surskribojn : « Nenio tro » = estu modera, « Konu cin mem » = konu ciajn limojn ; kaj aliajn moralajn konsilojn.

Apolono intervenas en la politika vivo :

ĉiu milito, ĉiu ekspedicio okazis nur post la konsiloj de la Pitio ; kelkfoje ŝi eraris : oni pensis, ke la dio, por momento, forgesis la homojn por esti nur sendependa dio. Por eviti troloĝatecon en Grekujo, Delfo konsilis la koloniadon en Syracuse, Gela, Crotone, Tarente ; Kelkaj kolonioj nomiĝis Apollonia kaj havis Pition (la Sibilo de Cumes) ; la moneroj de tiuj kolonioj portis tripiedon aŭ omfaloson. La Delfa pastraro bone konis la kapablojn de tiuj landoj kaj helpis la Pition en ŝiaj profetaĵoj ; en tiuj kolonioj oni fervore kultis Apolonon.

Apolono dio de la Harmonio

Kiel la Suno estras la Harmonion de nia tera mondo en la eterna ciklo de ĝiaj renoviĝoj, Apolono estis la animanto de sennombraj ritmoj kaj harmonioj. Lia beleco, kiun la Grekoj provis esprimi en statuoj, simbolis ĉian harmonion : fizikan, intelektan, moralan. La ĝojo, kiun li instigis estis pura rekompenco. Li ne asociiĝis kun la seksa, freneza ebrieco de Dionizo, nek kun la tristaj funebraj drinkadoj de Hadeso. Li estis la dio de la feliĉa ĝojo.

Li kreis la Muzikon kaj la Poezion por ĉarmi la homojn kaj ankaŭ la diojn. Li mem majstre kantis kaj ludis fluton aŭ liron. Apolono estis la « Pastro



de la Muzoj », kiuj dolĉe sugestis al la homoj la plej altajn kapablojn en sciencoj kaj artoj ; la Grekoj igis Astronomion Muzo, kies movojn regulis la liro de Apolono.

Ni admiru la ĉarmajn junulinojn, kiuj staras supre de alta kolono. Sur piedestalo, ĉirkaŭita de akanto-folioj, tri junulinoj, dorso ĉe dorso, dancas ; la suplaj tunikoj apenaŭ vualas la freŝajn korpojn kaj kruro leĝere paŝas antaŭen ; la altaj « Katalos » sur kiu staris bronza pelvo, duone kovras la ondumitajn harojn ; la vizaĝoj, ĉarmaj, spegulas puran animon en kiu murmuras nur harmonio, muziko, ritmo, poezio.

La Pitiaj Ludoj

Ili okazis antaŭ miloj da spektantoj, honore al la Serpento Pitono, la unua delfa legenda heroo. La unuaj Ludoj okazis en -582. Estis nur muzika konkurso, kiu komenciĝis per solena procesio. Poste, ĉiun 4-jaron, ili akceptis ankaŭ gimnastikajn konkursojn (kurkonkurso, lukto, pankraco- en kiu famiĝis Agias- ĉarkonkurso) ; ĝis 500 ant. K. ili okazis en la ebenaĵo Krisa ; poste oni kreis Sportejon, kiu entenis du kurejojn, palestron, naĝejon, banejon kaj ĉambron en kiu la luktontoj kovriĝis per oleo kaj sablo. En la Helenistika periodo, oni uzis la Sportejon por intelektaj renkontoj ; venis filozofoj, retoroj, fremdaj sciencistoj. Plutarque iĝis pastro de Delfo.

La « Aurige » : la ĉarkondukanto :

La ĉarkonkursoj estis tre ŝatataj de la grekoj : la « Aurige » memorigas al ni tiun fervoron ; ĝi estas unu el la plej belaj bronzaĵoj de la Antikvaj Tempoj. Estas junulo ; la paralelaj faldoj de lia tuniko, lia preskaŭ tima teniĝo, la pura ĝojo de liaj okuloj preskaŭ forgesigas al ni lian fortan muskolaron. La bendo de la venkanto retenas liajn buklitajn harojn.

Dionizo


Aliaj festoj malserenigis la purecan etoson de Delfo : la Dionizaj Festoj. Tiu kulto al Dionizo ŝajne asociiĝis kun tiu de la Diino Tera ; ĝi venis el la norda Grekujo (Tesalio, Epiro), ĉe el pli malproksimaj landoj : Tracujo, Scitujo, kie regis la Aziaj magiistoj. En Kreto, li estis la dio de la tuta vegetalaro, kiu mortas kaj renaskiĝas laŭ la cikloj de la sezonoj. Li estis la dio en la arbo, en la akvo, en la ebriiga vino, en la kapro, en la taŭro, simboloj de reproduktado.

Li estis filo de Zeŭso kaj Semele ; li estis duonfrato de Apolono. Oni reprezentis Dionizon sub la trajtoj de barba viro, vireca, maldelikata, aŭ sub la trajtoj de virineska junulo. Liaj atributoj estis la hedera krono, la vito-brancoj kaj precipe la tirso ; ĝi estis bastono ĉirkaŭita de vito-brancoj aŭ de hedero-folioj, kun, ĉe ĝia supro, abia konuso.

La kulto kaj la misteroj dionizaj diferenciĝis de la aliaj kultoj. Estis religio « popolaĉa kaj orgia » malfermita al ĉiu sekso, al ĉiu aĝo, al ĉiuj socialaj kondiĉoj. La Pitio mallaŭdis tiujn tro familiarajn praktikojn ; ŝi nomis « lascivia » tiun formon de Malbono. La Dionizaj kultantoj aŭ inicitoj identiĝis kun la dio mem. Tiun komuniadon okazigis la « dioniza ebrieco » pere de vino, de muziko, de danco, de halucinigaj fungoj, en manifestadoj bruemaj kaj frenezaj. La fideluloj manĝis la buĉoferitan viktimon, kiu simbolis la dion mem kaj trinkis la vinon, kiu simbolis la sangon de la dio.

La dionizaj festoj

Unue vito-festoj, ili konsistis el rita procesio, kapro-oferbuĉado, dialogoj, kiuj elvokis la dian riton. Menadoj, senditaj el diversaj urboj, sub gvidado de juna pastro, supreniris ĝis la altebenaĵo, kiu superstaris la sanktejon. Tie ĉi, en plena nokto, sub influo de vino, laŭ la ritmoj de flutoj kaj tamburinoj la Menadoj dancis kaj dronis en orgian deliron ; ili senhaŭtigis vivantajn bestojn kaj manĝis kruda ilian karnon.



Tiuj dionizaj orgioj okazis, kiam Apolono vojaĝis al Hiperboreujo, kie li restadis dum tri monatoj ĉiujare. Ili permesis al certaj homaj tendencoj, subpremitaj de la sociaj trudoj, eksteriĝi en fiksitaj periodoj. Dum tiu tempo Dionizo estis mastro de Delfo. La dionizaj ritoj asociis dancojn, kantojn, kaj maskeradon ; ili estis la fonto de la Grekaj komedioj kaj tragedioj.

La sanktejo de Atena

Atena estas filino de Zeŭso ; ŝi helpis la homojn kaj la diojn en iliaj luktoj por la triumfo de la Bono.

En Delfo, antaŭ la micena periodo, la Diino Tera havis ĉi tie sanktejon. Kiam Atena instaliĝis kune kun Apolono, ŝi prenis la nomon Pronaia : « la gardantino de la templo » ; ŝi havis aliajn funkciojn ; ŝi estis Ergane, la laborema (protektantino de la inaj laboroj) ; Ilitiria, la diino de la akuŝo (ŝi helpis Leto) Zosteria, la militistino (ŝi ĉiam estis apud Apolono en liaj luktoj kontraŭ la Gigantoj kaj la Amazonoj).

La Tholos estas tio, kio restas de la tria templo konstruita en -370 ; malmulte restas. Sed kiom trankviliga estas tiu ronda eleganta monumento ! Por momento ni forgesas la grandan majestecon de Atena, ŝian grandan povon sur la dioj, sur la batalantoj, ŝiajn terurajn kolerojn. Kaj ni elvokas nur la virinon virgan kaj ĉastan ; kaj inteligentan protektantinon de la literaturo, de la artoj, de la sciencoj, de la virinaj laboroj.

El la libroj de S-roj
Bonnard kaj Mercier.

PRELEGOJ DE GRESILLON

PRI FRANCAJ VIRINOJ EN INDUSTRIA SEKTORO

Francaj Virinoj eniris la naskiĝantan industrion de la 13-a jarcento sed, en tiu kadro, havis sufiĉe gravan rolon nur de la 15-a. Tiam, metioj estis ĉu viraj, ĉu inaj, tiuj lastaj pli speciale rilatantaj al vestaĵoj. Oni devis atendi la mekanikan progreson de la 19-a jarcento por ke sufiĉe amplekse viriniĝu la iama industrio. Tiam la laborista kondiĉaro estis tiel mizera, ke du salajroj estis nepre necesaj por vivigi familion. Siaflanke la « granda industrio » pli persistege dungis la feblulojn, t. e. virinojn kaj infanojn ĉar, al ili, ĝi donis malpli altajn salajrojn, (ĝenerale, tiama ina salajro estis la duono de la vira) malgraŭ sama daŭro de la labortago, kelkfoje dek-ses hora kaj en teruregaj higien-kondiĉoj. Iom post iom, oficiale, la virina tag-laboro iĝis dek-unu hora dum ses tagoj semajne. Sed, ĉe tiu epoko, estis libertempoj nur okaze de religiaj aŭ oficialaj festoj. Leĝo de 1909, kiu garantiis la ofic-retrovon al akuŝintino ĉe ŝia reveno post ne tre longa ripozo estis tamen grandega paŝo al pli homa leĝaro.

Sed, kvin jarojn poste, la unua mondmilito alportis en franca ekonomio, tiom da perturboj pro grandskala eltiro el la laborejoj de metiantoj, kaj profunda ŝanĝo de la produktaĵoj, ke subite la virinoj amase eniris oficojn ĝis tiam fermitajn al ili, kiel ekzemple ŝtalejojn, forĝofornojn, laminatejojn : Estis milito, armilojn oni bezonis por sendi al la viroj batalantaj !

Tamen, de 1918, la dek-hora labortago estis reglementa. Kiam, devige, ĝi estis plilongigita, tiam la laboristinoj ricevis gravan super-salajron.

La 1928-krizo enkondukanta ĝeneralan sendungadon denove revenigis la virinajn salajrojn al duono de la viraj. Feliĉe, dum la sekvantaj jaroj la socia evoluo ne regresis. Estis voĉdonitaj tre gravaj leĝoj koncerne la libertempojn. Denove, dua mondmilito pertubis la francan ekonomion kaj laboristaron. Virinaj salajroj plialtiĝis, tamen sen atingi la virajn. Denove, la aktiva partoprenado de la virinoj naskis admiron kaj ŝuldosenton de la viroj. Tio kaj senĉesa agado de la Laboristinoj, en, kaj per sia laboro, kontribuis al enkonduko de pli favoraj statutoj en la virina kondiĉaro : la rajto voĉdoni, inter aliaj tre gravaj.

Nun ni bezonas scii ĉu la intensigado de la mekanizado, hodiaŭ, alportis bonon aŭ malbonon al la industriaj laborantinoj. Okulfrape, maŝinoj, kiuj ĉe la komenco de la jarcento ankoraŭ similis al monstroj dikegaj, malbelaj, bruemaj, krudaj, senĉese iĝas pli elegantaj, pli facile moveblaj eĉ beliĝas... do, viriniĝas, ĉu ne ! Ĉar pli kaj pli aŭtomatigitaj, plej ofte, postulas nun de la uzantoj purajn direktilistajn taskojn kiuj ĝenerale emas al pripensoj, kalkuloj, decidoj, do al intelektaj reagoj... sed, restas la amaso de gelaboristoj kiuj, siaflanke devas produktigi la maŝinon, kiel eble plej grandskale, por la profito de la posedantoj : Nur la uzantoj povas reale scii pri la kvanto da fadenoj, metal-lutaĵoj, ŝraŭb- kaj boltingoj fiksotaj... kaj pri la ritmo de la munto- ĉeno en tundra bruego : Grandega energio- elpezo, grandega nerva laceco por ili.

Laboro de inoj ĉe munto-ĉeno estas aparte « infera ». Laŭ diroj de unu el ili, en ŝia uzino, mekanika munto-ĉeno postulas kvindekon da laboristinoj. Ĉiu el ili enmetas de kvindek ĝis okdek elementoj en du aŭ tri minutoj, operacio kiu ripetiĝas pli ol kvarcent fojojn tage ! La ĉen-ritmo ne permesas eĉ nazpurigon. Kiam la laboristino bezonas momente foriri, ŝi devas alvoki al « volante » aŭ « flugantino », t. e. ino, kies tasko konsistas el sinsekvantaj anstatauigoj de momentaj maldeĵorantinoj. Kompreneble, la motivoj al foriro devas esti plej striktaj. Ilia nombro estas kontrolata kaj en kazo de troa ripetado la laboristino ricevas rimarkojn pli malpli severajn.

Restas, ke por uzin-vizitanto, la munto-ĉeno ne estas tiel impresema, kiel la premilejoj, kie la deĵorantinoj, por sia sekureco, havas manojn ligitajn aŭ la ĉambroj por banado de rondirantaj presaĵoj, kie ĉiumonate la laboristinoj estas ekzaminataj per radiografioj kaj ilia sango analizita, tiel nocive estas ilia tasko (nocivo ne ŝuldata al la maŝino mem sed al la kemiaĵoj uzitaj). Ĉe la munto-ĉeno pura estas la laboro. Plej ofte, la virinoj estas sidantaj, sed tiu laboro tiel disdividita finfine estas tre lacega por la vid-povo kaj « malplenigas » la cerbon. Jes, tiaj laboristinoj asertas, ke ili perdas la memor-kapablon ĉar dum la labor-horoj nur parto de la cerbo funkcias, dum alia atrofiiĝas — eĉ science tion oni elmontris —

Aliaj taskoj, tre aŭtomataj, lasas libera la pensadon, sekve, inoj kiuj havas gravajn personajn klopodojn senĉese pensas pri ili. Ĉio kunligita enkondukas multajn nervdeprimojn. Plue, laborado ĉe konstanta lumigado kun fermitaj fenestroj por, ke maŝin-elementoj, aŭ produktoj tre multekostaj, ne ricevu difektojn, alportas pliajn san-perturbojn. En uzino, ne ĉiam la laboro efektiviĝas pere de munto-ĉeno ; estas individuaj, tamen mekanigitaj taskoj pagitaj ne pohore sed laŭ la nombro de la produktitaj eroj. Tiaokaze, agemaj laboristinoj povas duobligi la kutiman salajron. Sekvas, ke propravole kelkaj neniam paŭzas, manĝas rapide proprajn kunportitajn nutraĵojn. Terure ! Neniu helpo de unu al la alia. Ĉiu pensas nur pri sia persona gajno. Fabrik-kontrolistino, ne rilatas rekte al maŝino. Ŝia salajro iom superas tiun de ordinaraj laboristinoj, kiuj ĝenerale ne tre ŝatas ŝin. Tamen ŝia laboro restas peniga. Ŝi, post la retuŝistino devas, de malantaŭ dikiganta aparato, kontroli ĉiujn strekaĵojn, ĉiujn tuberojn de la finitaj objektoj. Ili respondecas pri la konvena muntado de ĉiuj eroj.

El tio ekaperas, ke uzin-laboro, per si mem, ne alportas gajiĝon al inoj, ĉar plej ofte ĝi estas seninteresa, monotona : « Ni ne scias al kiu aŭ al kio utilos nia penado. Ni ne komprenas kion ni faras » diras laboristino. Precipe, oni sentas, ke la estraro plinteresiĝas al pliboniĝado de la produkto ol al la farantoj. Tio estas al ni sufiĉe amara. Por eliri pli frue el uzino, resti malpli longe en la « infera rondo », profiti eksterajn plezurojn, aŭ havi la eblecon surpreni pli praktike la familiajn taskojn ni, laboristinoj, tre emas al seninterrompa labortago : Progreso, certe, en nia meti-kondiĉo, tamen densigitaj laborhoroj sen longaj paŭzoj estas lacegaj. Jen nia nuna horaro : Ellitiĝo je la sesa por foriri je la sepa. Komenco de la laboro je la sepa kaj duono ; unua dekminuta paŭzo je la deka kaj dudek minutoj ; dua kvinminuta paŭzo je la dekunua kaj duono. Poste, necesas « teni » ĝis la manĝo je la dekdua kaj kvardek minutoj. Tri kvaronhoroj estas disponeblaj por tagmanĝi. Fakte, kiam oni eltiras la irkaj reven-tempon el la manĝo-servo, la serĉado kaj instalado ĉe tablo restas nur dudekkvin minutoj por manĝi.

La seninterrompa labortago, kiu finiĝas je la deksesa kaj kvardekkvin minutoj permesas reveni pli frue hejmen, sed, en la uzino mem ne plu permesas kontaktojn aŭ amikajn renkontiĝojn. Cetere, restas al la patrinoj repreni infanon, aŭ infanojn, tiuj-ĉi el diversaj lokoj se ne ĉiuj sufiĉe samaĝaj, provianti, kaj en la hejmo plenumi la plej urĝajn taskojn, kuiri, purigi ; ankaŭ uzi la finsemajnajn ripoztagojn (eŭfemisme) por pli grandskale entrepreni mastrumajn taskojn, feliĉe kun la helpo de la maŝinoj ! (Maŝinoj lacigis inon en la uzino, maŝino kontribuas al hejma ripozo !).

El tio, ni povas stud-provi la nunan staton de franca laboristino. Nekontesteble, ĝi spertas diferencigon. Laŭ stud-raporto de I.N.S.E.E. (Nacia Instituto pri Statistikoj kaj Ekonomiaj Studoj) ofte, virina entuta jar-salajro estas nur la dutriono de vira. Oni provis ĉesigi tiun diferencon voĉdonante, plej oficiale, leĝon « Je sama laboro, sama salajro », leĝo aplikata en kelkaj sektoroj el kiuj la ŝtata, sed aliloke, la plej granda diferencigo devenas ne nur de la salajraj bazoj mem sed ankaŭ de la laborfakoj. Plej ofte, viroj kaj inoj, aŭ ne plenumas samajn profesiojn aŭ, en sama metio, ne havas similajn specialaĵojn, tio plej ĝenerale malprofite al la laboristinoj. Laŭ faka revuo « Ekonomio kaj Statistikoj », tuj de la enirado en aktiva vivo, viroj kaj inoj lokiĝas en malsamaj situacioj. Ŝajnas, ke la familia virina rolo, kaj ties konsekvencoj en profesia plenumado — interalie malpli longdaŭra aŭ intensa metilernado — influas al diferencoj tre facile konstateblaj inter la salajroj de gelaboristoj. Kompreneble, nenio kaj neniu malpermesas al inoj akiri konvenan metilernadon sed la nepra neceso por multaj el ili plenumi du labortagojn en unu : la profesia kaj la familia, konsistigas obstaklon, kiam tiu plenumado devas efektiviĝi ekster la labor-horoj. Do, tradicie, sektoroj estas pli virinaj ol aliaj, ekzemple en teks-industrio kaj ties derivaĵoj (tie, 50 % de la salajratoj estas inaj kiam en metalurgio estas nur 7 %). Videble, viroj ne tre emas eniri teks-industrion pro malplialteco de la gajnoj.

Kiam oni ekzamenas la hierarkian konsiston, saman fakton oni konstatas : Malpli ol 10 % de la kadroj estas inaj ? malpli ol 2 % inter superaj kadroj. Se, en industria sektoro estas pli da laboristoj ol da inoj, plie, tie, la viroj havas rolon kaj pagon de kvalifikitaj metiistoj aŭ fakĉefoj kiam la inoj estas simplaj laboristinoj. Sed, ĉu ne estus surprizego por plej fervoraj feministoj konstati reagon de inoj kiam, en uzino, ekzemple, oni provas doni al ili taskojn ĝis tie tradicie rezervitajn al viroj ? Tiaokaze, laŭdire, estas diversaj psikologiaj reagoj, tiel en la virinaj sekcioj, kiel en la viraj. La unuaj hezitas eniri fakon ĝis nun ne sia. La duaj ekrezistas kiam « invadantinoj » sin anoncas. El eksperimentadoj en tri diversaj metalurgiaj uzinoj aŭ maŝin-fabrikejoj rezultis, ke tre malnovaj antaŭjuĝoj ankoraŭ restas vivantaj : Unu el la argumentoj de submastroj aŭ fako-ĉefoj, kiuj longe, diversgrade, spertis la metion, estas malfido pri virina kapableco al rapida plenposedo de sama labor-kapablo. Tamen, inter samgradaj gekolegoj, estas pli sincera kaj lojala rekonado de ambaŭa kapablo kaj ne ĉiuj superuloj estas blinde malamikaj ! Cetere, sekve de natura, iompostioma forpaso de generacioj en kiuj nur la viroj havis la rajton voĉdoni, de pli intensa politikigado de la junularo, disvolvigo de geaj studoj, profesioj, ripoz-amikoj, pli ampleksa informado dank'al radio, televido, ktp., altiĝo de la ĝenerala kulturnivelo, sento ke persona valoro pli dependas de la kvalitoj (korpaj aŭ mensaj) ol de la sekso, aĝo aŭ edukado, oni alvenas al novaj konsideroj rilate la partoprenon de inoj en superaj roloj, profesiaj aŭ politikaj.

Restas, ke iuj fakaj laboristoj tre timas, ke virinoj rompos la labor-kadencon ĉar tiuj lastaj ĝenerale estas tre rapidemaj en man-faradoj, eĉ en tradiciaj vir-profesioj, kiel torn- aŭ frez-adoj ili povas esti pli rapidaj kaj lertaj ol viroj. Sia-flanke, sindikataj delegitoj, kiuj ofte riproĉas al la virinoj tro facilan obeemon kontraŭ mastra aŭtoritateco kiam ili estas subalternulinoj, timas pri kreskiganta disciplinemo kiam ili iĝos sub-mastrinoj. Ĉu el tio oni povas konkludi, ke se okaze la virinoj estos pli grandskale malpli bonaj specialistinoj, se ili laboros malpli rapide kaj bone, se ili estos iom pli ribelemaj kontraŭ la superuloj, tiam ili gradiĝos ? Priridinda demando ! Tamen, verdire, multaj el ili tro ofte ankoraŭ bremsas sian promocion ĉar tro rezignaciantaj pri sia virina sorto, tro dubantaj pri siaj intelektaj kapabloj, ne sufiĉe ambiciaj. Ĉu pli bone se, inverse, ĉiuj inoj iĝus troemaj ? Certe ne, ĉar ili estus ĉirkaŭataj de malamego. Tion oni spertas kiam ekaperas timoj pri mal- aŭ sen-dungado. Tiam viroj havas sindefendeman reagon. Ili rekonas laborlokon al virino nur se ili mem estas certaj pri sia propra. De ĉiam, laboristinoj estis la unuaj viktimoj en okazo de ekonomia krizo, do daŭre konsiderataj nur kiel kunhelpantinoj, kaj laŭbezone.

Tamen, ni ne kredu ke labormastraro entute havas nur malbonajn intencojn rilate la virinojn. El gazet-artikolo precize titolita « La franca labor-mastraro kaj la virinoj » oni povas legi « Totala samegaleco inter viroj kaj inoj admonas al entreprenoj la Nacia Centro de la Franca Mastraro » tiel konfesante, ke ĝi ne ankoraŭ ekzistas, nek ĉe la nivelo de metilernado nek pri la eblecoj de plialtiĝo en karieroj. Sekve,tiu Centro rekomendas por la 8.041.500 virinoj kiuj profesie aktivas, pli bonan orientadon, starigon de pli bona politiko en labor-dungado, pli taŭgan aranĝadon de la labor-horoj, kreadon de pli multnombraj infan-vartejoj por doni al la patrinoj-laboristinoj pliajn eblecojn akordigi la familian vivon kun la profesia. Aliparte, aĝo ne plu devus bremsi dung-eblecon.

B. CHEVERRY.

ABONIGU VIAJN AMIKOJN AL KULTURAJ KAJEROJ

Jarabono : simpla 25 fkoj
bonfara 30 fkoj


Pagu nepre al la Poŝtkonto 2 813 61 Nantes, ne per ordinara mandato.

Vintrodormado

Por rezisti al tiu rigora vintro, tiuj estuloj povis nur sin turni al dormado.

Kelkaj, inter la dormantoj, estas kaptitaj en la glacio aŭ en la tero durigita de la frosto. Miriadoj da ovoj, inertaj, gluiĝis ĉe la akvaj plantoj, aŭ kaŝiĝis en sablo, en koto, en la fendoj de la arboj, sub la rokoj kaj ŝtonoj ; ovoj rezistemaj al ĉiaj travivaĵoj, supervintrodormantoj, demetitaj de bestoj, kiuj, kiel adoltuloj, tute ne kapablas rezisti al la vintraj rigoraĵoj.

Kelkaj, apenaŭ videblaj, estas ariĝintaj en gelatenaj amasoj ; aliaj, same malgrandegaj, estas protektitaj de ia ŝelo, kiu tute ne ĝenos la predantojn ; ankoraŭ aliaj, kiuj havas infinitezimajn dimensionojn ; tial ili eble bezonos multajn jarojn por supreniri el la fundo de la lageto ĝis la supraĵo. Ankaŭ miriade estas la unuĉelaj protozooj, la algoj, la fungoj, la bakterioj ; ĉiu el ili konstituas enton individuan kaj sendependan, kiu, laŭlonge de la venontaj sezonoj, ĵetiĝos en neĉesan agadon superregita de tiu Naturo-leĝo : manĝi aŭ esti manĝita.



Fositaj de lumbrikoj, la ĉirkaŭaĵoj de la lageto estas nur retaĵo de subteraj galerioj : unuj ne profundaj, dum la aliaj enprofundiĝas en la grundo kaj kelkfoje konverĝas al loĝejoj, plenplenaj je dormantaj lumbrikoj premitaj unuj ĉe la aliaj ; eble talpo venos ĝis ĉi tie por kvietigi sian malsaton. Sed, por la dormantaj vermoj, la plej grava danĝero estas la frosto.

En la galerioj de neĝo-kovrita formikejo, multege da formikoj amasiĝis ; la likvaĵoj de ilia organismo mistere transformiĝis por havigi al la bestetoj eksterordinaran rezistemon al la fortaj malvarmoj ; eĉ ilia koro ne plu batas.

Ankaŭ la kokcineloj profunde dormas en la anfraktoj de rokoj, en kiujn la pluvo infiltriĝis ; kelkaj miloj da kokcineloj estas kaptitaj en la travidebla glacio : ili kapablas postvivi ĝis degelado. La dormantaj ranoj, kiuj lasis sin surprizi de la glacio, postvivos, kondiĉe ke tiu ĉi ne atingu ilian koron ; kelkaj, kiuj jam atingis la pli profundan ŝlimon, timas plu nenion. Sonaj bufoj estas kovritaj de etaj ranetoj ; kaj, en la koto, bubalo-bufo estas ĉirkaŭita de makuletitaj ranoj. La ranoj timas la serpentojn ; ĉi-momente tiuj ĉi dormas spirale-volvitaj en kavigita arbo aŭ miksante siajn galciitajn ringojn en malnovaj stumpoj.

Enprofundigitaj en la sablo, kiu borderas la lageton, ovoj de testudoj atendas la sunon, kiu okazigos ilian eloviĝon. Kelkaj estos grandaj kiel rubekolo, aliaj pli etaj ol muŝobirdo.

Salamandroj kun verdaj, flavaj, rŭgaj nuancoj, punktitaj je harmoniaj makuloj vintrodormas, montrante ĉiun stadion de sia evoluado : ovoj aglutinitaj en viskozaj amasoj, larvoj kun naĝiloj, adoltuloj, kiuj iras kaj reiras sub la glacio. Por ne esti frostigitaj multe da verdaj muŝoj enprofundiĝis en la putriĝantan fibron de mortaj branĉoj kaj stumpoj ; ili estas nenombreblaj ; iliaj larvoj invadis la akvon kaj la foliojn ; iliaj ovoj atendas en la ŝelo de la arboj kaj sub la ŝtonoj ; ĉe ilia vekiĝo, ilia zumado vibrigos la ĉirkaŭantan aeron. Same diversaj, same multnombraj la koleopteroj montros senliman inĝeniecon ; tuj de ilia vekiĝo, ili komencos bori, flugi, naĝi ; laŭ sia propra naturo, ili estos herbovoraj, karnovoraj, kaj eĉ kanibalaj.

En sia subtera ŝirmejo la larvoj de melolontoj 50-obligis sian komencan longon.

La grajnoj, ankaŭ ili, dormas, en la tero, en la akvo, en la koto ; ili atendas la horon de sia ĝermado : rekordo estas ilia dormo : kelkaj de antaŭ 50 jaroj !

En la pasinta aŭtuno, bukedo de ulmoj liberigis 10 milionojn da flugilhavaj grajnoj ; apenaŭ unu dekduo ĝermos ; tamen la arboj daŭre provos sian ŝancon kaj pluvigos super la lageto siajn semojn. La ĉiam pli malalta temperaturo paralizis plurajn moskajn ratojn ; naĝante sur la glacio, mustelo enŝoviĝas en ilian ŝirmejon, tiras la dormantojn ĝis sur la neĝo, kaj ilin buĉas

La procionoj estas intermitaj dormantoj ; ili baldaŭ vekiĝos, faros promenadon sur la neĝo, kie ili pariĝados, antaŭ ol reveni al sia semi-vintrodormado.

En la plej profunda fendego de granit-rokoj duondormas kolonio de vespertoj ; en la griza mallumo, centope ili pendas de la roka volbo, strikte premitaj unuj ĉe la aliaj ; unu preskaŭ ne spiras, apenaŭ 10-foje hore ; alia ĉiun 2an sekundon ; tria pli rapide spiras ; ĝiaj flankoj komencas freneze bati, ĝiaj okuloj malfermiĝas ; ĝi etendiĝas ; siavice aliaj ĝin imitas ; kiel sagoj ili flugetas supren, malsupren tra la mallarĝa fendego, neniam tuŝetiĝante unuj la aliajn. Bruske, per unu nura movo, ili resupreniras ĝis la volbo, alkroĉiĝas al ĝi kaj subite refalas en sian vintran dormon.

En siajn profundajn ternestojn la « tamia-oj » alportis glanojn, nuksojn, avelojn, ĉiajn grajnojn kaj herbojn ; kelkfoje ili vekiĝas por rapida manĝo kaj direktiĝas al siaj subteraj necesejoj antaŭ ol reiri al siaj kuŝejoj.

La Vekiĝo

Kiam la tempesto furiozas, oni povus pensi, ke vintro neniam finiĝos. Tamen, la lageto, kiu longe dormis sub la glacio, iun tagon vekiĝas, post la ŝtormo, en plena akvoaltiĝo. La restaĵoj de neĝo-duno montras frostitan leporon, kiun foino buĉis ; kaj la leporo, kiu komencis degeli, apartenas al la kadavro-manĝantoj. En la lageto, ĉirkaŭ la lageto, nova vivo jam emociiĝas en la ovoj, la grajnoj, la larvoj. La tero, superplena je akvo, puŝas al la lumo, legion da herberoj.

Salamandro elmergas el la ŝlimo en nubo el plej diversaj defalaĵoj ; luktante kontraŭ dormo 150-taga, ĝi pene hisas sin sur glaciblokon, kiam mustelo ĝin glutas.

La ŝlimo ŝveliĝas liberigante multon da ranoj. Unu testudo rompas la duran tero-kruston kaj lante direktiĝas al bukedo de saksifragoj, kie ĝia karapaco intermiksiĝos kun tero, plantoj, ombroj, sunmakuloj ; el ĉi tie ĝi gvatos melolontojn, helikojn, araneojn, muŝojn : predoj facilaj, kaj ankoraŭ duondormantaj.

La fandiĝanta glacio liberigas helikojn pomile ; kelkaj falas ĝis fundo de la lageto, kie ili putriĝos ; aliaj, strecîĝante sian viskozan korpon, ekiros serĉe al nutraĵo. Verda muŝo malĉifas siajn flugilojn.

En kavo de arbo 38 000 fekunditaj moskit-femaloj malrapide elmergas el la dormo. Tuj de la vekiĝo ili ekiros serĉe al la unua guto de sango ; poste la masklo sucos la sukon de la vegetaloj dum la inoj pumpos, eble el ia dormanta birdo, la sangon, kiu estas al ili nepre necesa ; tiu manĝo havigos al ili la energion bezonatan por demeti la ov-grapolojn en la stagnaj akvoj, kiuj ĉirkaŭas la lageton.

Formikejo estas totale detruita de rivereto okazigita de la degelado ; sur la grundo la kelkaj postvivantoj vagas sen celo nek loĝejo.

La rivereto kiu nutras la lageton, alportas la 14-krurajn oniskojn, grandajn kiel muŝoj kaj kiuj nutriĝas je putriĝanta vegetalaro. Tuj la kankroj eliras el sia kaŝejo kaj entreprenas ilin manĝegi. La grandaj ditiskoj subite eliras el la ŝlimo ; ilia violeta brilanta korpo reflektas, kiel spegulo, la printempan sunon. La « gyrin-oj », bronzverdaj, eliĝas el la viskozaj plantoj de la fundo.

La fundo de la lageto svarmas je nimfoj, kiuj, fininte sian metamorfozon, forflugos en la liberan aeron. El la defalaĵoj akumulitaj sur la altaj fundoj, eliras diatomeoj kaj « desmidoj » : vera vivanta polvo ; spite ilian nombron, ili restos nevideblaj ; kiam ilia kvanto, jam enorma, estos ankoraŭ multiĝinta, ili formos verdan muskon sur la rokoj brunajn makulojn sur la tigoj ; ili konstituas la esencan elementon por la faŭno de la lageto. Akvopuloj, akvaj araneoj, plej diversaj vermoj siavice aperas en la akvo. La « planeroj » gracie ondadas ; la etetaj ŝlimvermoj elstarigas sian kapon inter du ŝtonoj, serĉe al nutraĵo. Junkoj, kanoj, akvo-lentoj plej haste kreskas por atingi la supraĵon.

luktas por eligi sin el sia karapaco. Finfine tiu ĉi fendiĝas sur la dorso, laŭ la tuta longo, liberigante ian humidan viskozan monstron, kies flugiloj estas gluitaj ĉe flavaĉa kaj vundebla korpo. Obstinega, la insekto elmergas el sia envolvaĵo, post dolora svebado, kiu ĵetas ĝin malantaŭen. La flugiloj sin ornamas je nervuroj kaj malvolviĝas. Kiel sago la libelo forflugas super la lageto, forlasante sian brunan kitinan malliberejon alkroĉita ĉe la planto. En unu tago 200 libeloj spertis tiun lastegan metamorfozon. Unu el ili kaptas makaonon kaj ĝin metode manĝegas ; ĝi malfruiĝas sur bukedo de tifaoj ; dume, el fundo de la lageto, oni ĝin observas ; dika kapo elsaltas el la akvo ; prenebla lango antaŭen jetiĝas ; kaj la libelo malaperas.

Hazardo volis, ke formiko grimpu laŭlonge de tigo ĵus kiam aro da mantoj ekaperas ; movante siajn antenojn, ege rapide ĝi malsupreniras kaj tuj revenas ĉe kapo de formik-kolumno ; kelkajn sekundojn pli poste ili sin pelas sur la malmolan karnon de la ĵus naskiĝintaj mantoj ; estis la ĝusta momento ; unu tagon pli poste, tiu malmola karno estus duriĝinta kaj estus protektanta la junajn mantojn. Kvankam la formikoj plej rapide ilin mortigas, ankoraŭ kaj ankoraŭ aperas la mantoj. Kiam tiu abundo-korno estis elĉerpita, la formikoj retiriĝis.

Franklin RUSSEL.
El la libro « La misteroj de la lageto ».

Loko sub suno

Fakte la lageto disponas nur limigitajn porvivaĵojn ; ĝi estas organizita komuneco, en kiu apero de nova vivo postulas detruon de alia vivo. Por havigi al si sian parton, la bestoj sin fordonas al senkompata, plej sekreta batalo.

Dika larvo de libelo, antaŭenpuŝita de la akvo, kiun ĝia abdomeno sucas kaj forĵetas je sammezuraj intervaloj faras salton al tigo de planto ; ĝia maskita kapo eliĝas el la akvo ; en ĉi tiu momento ĝia organismo suferas la plej draman akton de sia metamorfozo. Aera adoltulo baldaŭ anstataŭos la akvan insekton ; ĝi senmoviĝas ; la brilanta envolvaĵo, kiu ĝin entenas, sekiĝas kaj malmoliĝas ; ĝiaj kruroj alkroĉiĝas al branĉo ; la insekto



Harfajnaj Radiketoj

Mi staras dimanĉon antaŭtagmeze ĉi tie sur la mallarĝa ĉefplaco de Régusse, ĉirkaŭbarita de altaj domoj, en la ozona montara aero. Estas la komenco de vintro kaj ni estas je alto de kvincent — sescent metroj, tamen el la sennuba, lazura ĉielo la suno verŝas majan varmon, ĉar ankaŭ ĉi tiu loko situas en « Lazurlando ». Marsejlo distas fluglinie kvardek kvin kilometrojn. Survoje ĉi tien antaŭ dudek minutoj ni ankoraŭ preterlasis turaltajn palmojn kaj, pli frue, florantajn kaj samtempe fruktantajn oranĝarbojn.

Ĝi ne estas la unua alpa vilaĝo ĉi tie en supra Provenco, kiu plezurigis min, sed nun aldoniĝas ankoraŭ io speciala al mia travivaĵo.

Ĉi tiu bona travivaĵo estas solena. estas ankaŭ la eksteraĵo, kie la konfuza — kaj pro tio klarigenda — sento kaptis min.

Sur la placo la vic-prefekto de la vilaĝo, Monsieur Gabriel Sappe, akceptis min. La juna notario de la vilaĝo, M. Bernard Sappe, filo de la ĵus menciita Sappe, malfermas la pordon de nia aŭtomobilo kun ĝentila komplezo. Ili bedaŭras, ke la prefekto mem ne povas ĉeesti, ĉar li estas malsana kaj kuŝas en la hospitalo. Sed anstataŭ li ĉi tie estas la tuta estraro de la loka Historia kaj Regionesplora Komitato : MM. Marcel Jean, Mlle Mireille-Agnès Bagarre, Mme Gustav Pères.

La manskuo de la diktrunka, fortmuskola s-ro Gabriel Sappe estas tiel afabla, ke ĝi fariĝas preskaŭ brakumo kaj tiu de la aliaj estas simila. Videblas, ke krom la kutima ĝojo de gastameco, ankaŭ ili havas iun aldonan travivaĵon.

La klarigo de ĉi tiu speciala travivaĵo povas interesi ankaŭ pli vastan rondon ol tiun, kiu nun ĉi tie svarmas ĉirkaŭ nia aŭtomobilo, pli kaj pli multiĝante kun tiuj, kiuj rapide venas el la domoj. Sed kiel oni devus komenci klarigi ĉi tion ?

En mi — por ke mi prezentu min la unua kiel esplorendan subjekton — kaŝiradas tiu absurda ideo, ke mi staris sur ĉi tiu placo antaŭ kvarcent jaroj — tio estus la vera, la baza travivaĵo — kiam laŭdire la nomo Sappe ankoraŭ estis elparolata Papp, Jean Jànos, Bagarre Bogàr kaj Pères simple Piros ; kiam la tuta vilaĝo ankoraŭ estis hungara ankaŭ en la ĉirkauaĵo estis eĉ dek aŭ dek kvin tiaj vilaĝoj, se ne pli. Jes, ĉi tie sur la supro de Provenco.

Antaŭ precize kvarcent tridek kvar jaroj, en 1533, venis ĉi tien en la tiaman Régusse-n, tute neloĝatan kaj kuŝantan duone ruinigita, la unuaj hungaraj koloniuloj el la sklav-komercejo de Konstantinopolo. Kaj ilia legenda historio, kiun mi finaŭskultis, estas la sekva : En 1526 tuta Hungarujo sterniĝis surtere ĉe Mohàcs pro terura pugnobato. La anarkia lando de etreĝoj staris kontraŭ necedema, centraliza, militista ŝtato. Se tiaspeca, masiva potenco povas atingi oligarkiojn en la ĝusta proksimeco, ĝi tiel disfaligas ĉiujn, kiel la globo de kegloludanto la keglojn. La tiama turka militforto, se ĝi povus havi lokon apude, sternas iun ajn oligarkian landon de Eŭropo. « La masakranta jarcento de Zàpolya », kiu aliloke estas nomata la epoko de la centjara milito, naskis en la okcidento popolpereigantojn eĉ pli senrespondecajn ol niajn etreĝojn. Sep jarojn post Mohàcs la otamana hegemonio, per siaj kruelaj organizaĵoj, el la hungaraj vilaĝoj restintaj sendefendaj, incendiitaj, senobstakle elpelis en longaj marŝoj la popolon kapablan piede iri : la junan viron, virinon kaj la adoleskulojn. La aliaj kuŝadis tie sub la karboniĝintaj restaĵoj.

Imagebla estas la trafiko de la sklav-komerco de Konstantinopolo, se la terura « varo » venis eĉ en Francujon. Ankaŭ ĉi tio havas sian historion.

La oligarkio eĉ sen ekstera helpo, tute ruinigis parton de Provenco. La internaj bataloj, la religiaj militoj kaj fine la pesto senpopoligis aron de vilaĝoj. La Johanita Ordeno, iam fondita en Jerusalemo — ties kompleta nomo estas la Jerusalema Kavalirordeno de Sankta Johano la Resaniganto — fariĝis la preĝej-patrono kaj fine la sola posedanto de la malpleniĝinta teritorio.

Ĝi havis ankaŭ « pacan » kontakton kun la turkoj. Kaj ĉar de post Francisko la Unua ankaŭ Francujo kunlaboris kun la Plejalta Pordego, estiĝis la interkonsento, ke la Johanitoj — en bela asocio de intereso kaj kristana konscienco — denove faru profitdona la dezertan francan kamparon per siaj samreligianoj elaĉetitaj de la otomana sklaveco.

Dum entute dudek kvin jaroj trafikis la ŝipoj inter Konstantinopolo kaj Marsejlo, laŭ la atesto de la arkivoj ekzistantaj ankoraŭ hodiaŭ.

La unua enskribita nomo, kiun oni povas opinii hungara, estas Rigôdy. Certe tiu devenas de iu loĝloko Rigôd de la regiono Szerémség, tiam dense loĝata de hungaroj.

La franca historiografio ĉi ĉion plurfoje aludis. Ke Régusse kaj ĝia ĉirkaŭaĵo estis hungara kolonio, estas antaŭ mi presite ankaŭ en la libro pri loka historio de la departemento. Sed la Régusse-anoj mem sciiĝis pri tio de unu el niaj samlandanoj alveninta ĉi tien antaŭ kelkaj jaroj. Ankaŭ mi povas danki al li — Artur Garamvölgyi, la nelaciĝema kolektinto de informoj — ke mi nun staras ĉi tie kaj rigardas kun ne kontestebla kortuŝo la emociiĝintajn Régusse-anojn.

Nur la historio mem — tiu kvazaŭ historia romano memoriganta pri Jôkai kaj Gârdonyi — sufiĉas, por ke ni faru ĉi tiun flankeniron sur la vojo de Cannes al Parizo. Sed plibone interesas min ĉi tiu reciproka emociiĝo ol historia fakto aŭ romantiko. Kio estas ĝia vera kaŭzo kaj senco ? El kio ĝi estiĝas kaj kien ĝi kondukas ? Ĉu ĝi estas utila aŭ senutila, aŭ ĉu eble malutila, ĉar ĝi ja kondukas al ne-esplorita teritorio, eĉ provizita per « danĝero » — tabulo ĉi tie kaj tie.

Precize respondi al tio ne estas tiel simple, kiel ŝajnas en la unua momento. Unu el la plej disbranĉiĝantaj problemoj de nia epoko etendas ĝis ĉi tie — ĝis la fund-tavolo de la animo — siajn harfajnajn radiketojn.

En la pli ĝusta nacia konceptado, tio estas la kolektiva sento.

Elstara franca poeto kaj profesoro pri filozofio veturigis nin ankaŭ ĉi tien al Régusse. Mi havis okazon interŝanĝi vortojn kun li pri la filozofia kaj sociologia flanko de la demando. Nun mi dezirus paroli pri tio kun la Régusse-anoj, kvazaŭ de la praktika flanko.

Malgraŭ ke tie kaj aliloke etaĝaj, du- trietaĝaj, sveltaj domoj estas strikte premitaj unu al la alia, Régusse ankaŭ hodiaŭ estas kampara vilaĝo, karakterize provenca. Ĉiu, kiu laboras, vivas el la kultivado de la vito, la olivarbo, la lavendo kaj iom da greno ; ankaŭ el la ĉasado — apro troviĝas ĉi tie — kaj el la vendo de trufoj.

M. Gabriel Sappe prenas min ĉe la brako per sia peza manplato, vere tiel afable, ke pro tio li povus esti eĉ mia onklo Gabor Papp, kaj gustume ĉirkaŭpromenigas min en la koro de la vilaĝo. Poste li kondukas min en la « mairie », en la vilaĝdomon.

Jen, ĉi tio estas lia oficiala ĉambro kaj tio la registrejo, pli ĝuste la arkivejo.


Ĝis la malproksima Mezepoko ekzistas la libroj pergame kaj lede binditaj. Unu estas larĝa je manplato kaj ankaŭ tiel maldika. Alia estas eĉ pli dika kaj pli peza ol meslibro. Kaj estas rulaĵoj kaj folioj sur bretaro kovranta tutan muron. Kaj tiuj, kiuj interesas nin estas jam pretigitaj sur la tablo.

(Daŭrigota).

Hajszàlgyökerek de ILLYÉS Gyula. El kun garigis. Eva kaj Bernard Golden.

POR VIA DISTRO

SOLVO DE LA ANTAŬA PROBLEMO



Krucvortoj

NOVAJ PROBLEMOJ

Patroj kaj filoj

Du viroj, Ludoviko kaj Petro, akompanataj de sia filo, Jako kaj Andreo, aĉetas librojn en librovendejo.

La kosto de ĉiu libro egalas la nombron da libroj aĉetitaj. Ĉiu patro elspezas 15 stelojn pli ol sia filo kaj Jako aĉetas tri librojn pli ol Ludoviko.

Kiu estas la patro de Andreo ?

Kalkulu !

Ĉu vi scipovas skribi la nombron 134 498 697, uzante nur unu foje la ciferojn en la natura ordo, kaj uzante kvarfoje la signon +.


Komune...

Tiuj famaj viroj : Filipo II de Makedonio, la kartaga generalo Hannibalo, la marŝalo Masséna, la politikulo Gambetta, la fizikisto Marconi, la poeto d'Anunzio, Henriko II reĝo de Francujo, havis ion komunan. Kio estis ?...

Trovu la koloron !

Ĉasisto rigardante suden vidis urson je 100 metroj ekzakte. La urso fuĝis perpendikle al la nordosudo direkto, kaj tiel antaŭeniras je 100 metroj ekzakte, ĉar la ĉasisto pafas kaj mortigas ĝin. La ĉasisto iras rekte al la urso kaj li bezonas marŝi 100 metrojn ekzakte por atingi ĝin. Matematike trovu la koloron de la urso.

Krucvortoj



Horizontale kaj vertikale

1° Preĝejo.

2° Gaso el Jupitera atmosfero.

3° Tembro (radiko) — Monaĥa vivejo (radiko).

4° Japana baza monunuo (radiko) — Fino de preĝo.

5° Tre amata de la virinoj (radiko) — Sufikso (inverse).

6° Hebrea titolo — (inverse) : Metalfolio (radiko).

7° Floro (radiko) — Sentegmenta spaco (radiko).

8° Konsulti la sorton (radiko) — Tion diras la hipnotigisto.

9° Ŝtono polurebla (radiko).

10° Turista loko en Parizo (Franclando).

GRAMATIKO PER BONHUMORO

ANTAŬ — ANTAŬ OL (PIV)

Antaŭ (prepozicio) montras lokon aŭ tempon. En loka senco « Antaŭ » montras.


1) **Pozicion :** sen movo (antaŭ la arbo staras arbo) ;
: ĉe movo (ĉe la irantaro vi paŝos antaŭ mi).

2) **Almovon** (ŝanĝon de loko)
ne restu apud mi, vi ĝenas min ; iru antaŭ miN.

RIM : **Se la almovo koncernas NE la substantivon** (aŭ pronomon) sed alian vorton, kiun oni subkomprenas, **oni povas uzi sen eraro la Nominativon** : oni metis antaŭ **mi** manĝilaron (sur la tabloN).

En tempa senco Antaŭ montras **pli fruan tempon :**

— certe via aŭtomobilo tre rapida alvenos antaŭ la mia ;
— antaŭ 3 tagoj li estis en Grezijono.



Ĉu iĝi elmontremulo ?

Antaŭ ol ekstari — kio urĝas, ĉar miaj brakoj laciĝas — mi deziras, ke vi rapide solvu por mi problemon. Kion mi povas fari ? La kaŭĉuko de mia bankalsono rompiĝis !

Uzo de OL por eviti konfuzon inter loka kaj tempa senco :

— vi cedos antaŭ mi (antaŭ mia volo) ;
— vi cedos antaŭ ol mi (pli frue ol mi).


RIM : antaŭ verbo, **Antaŭ Ol** estas subjunkcio kaj signifas **antaŭ la tempo, kiam...** : antaŭ ol vi finos la purigadon, mi estos alveninta.

RIM : kiam la du propozicioj havas la saman subjekton oni povas uzi infinitivon : li salutis antaŭ ol foriri (antaŭ ol li foriris).



Antaŭ tiom da belulinoj !

Ho ! mia karulino, pardonu mian eraron ! Mi longtempe serĉis vin meze de tiuj sunbaniĝantinoj. Antaŭ ĉiuj tiuj virinoj bankostume vestitaj mi kredis, ke ĉi tie estis mia trankvile dormanta edzineto.



Tuj iru malantaŭ min ; la kuracisto firme konsilis al vi : nepre evitu ĉian emocion. Kaj jam danĝere vi okulumas al tiuj dezir-naskantaj knabinoj !

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (120 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (220 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (2,50 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (35 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, Donnerink 10 C 20 05800 **Hyvinkää** (23 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (15 mk.).

Hispanujo : S-ro Manuel Romero Gomez, Arzobispo Apaolaza, 32-Ent. A ZARAGOZA (320 pes.)

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Alfieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (2 500 lires).

Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (1 800 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (80 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL. ZH pĉk 209721 (15 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN (30 kr.).

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.

Rumanio : S-ro Radu Pàtrascu, str. Pompiliu Manoliu 13 Bl. G2 ap. 75-7000 Bukareŝto-39.

Sovetunio : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 393 Rostov Don — 7.

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (24 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (20 fr.).

Usono : S-ro Jones R. Kent, 3318 N. Lake Shore Drive, n° 801, CHICAGO, Illinois 60 657.

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per respond-kuponoj (20 respk.).



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier

Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 1 de 1976, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Les adhésions ont commencé à arriver. Pour Pâques sont annoncés des enfants de deux écoles françaises, de Belgique, vraisemblablement d'Italie, d'une enseignante finlandaise et d'enseignants français, évidemment. Nous attendons d'autres inscriptions, car nous aimerions joindre la quantité à la qualité et à la variété.

Je crois que les amis décidés à venir en été devront nous le faire savoir très vite, en particulier en ce qui concerne la première période de juillet. Pour cette époque, les inscriptions sont déjà nombreuses. On peut cependant regretter que certains inscrits aient confondu les activités pré-Ridef (12-22 juillet) et cours d'espéranto et aient réservé leur chambre pour dix jours seulement. L'espéranto est facile, dit-on, mais en dix jours il est bien difficile de se préparer sérieusement à participer à une rencontre internationale.

Pour les trois périodes d'été, les demandes de renseignements arrivent régulièrement de nombreux pays. Des espérantistes qui ont déjà fait preuve de leurs compétences et quelques nouveaux venus ont promis de prêter leur concours pour la réalisation du cycle de conférences. Nous rappelons que pendant cette deuxième période il y aura, parallèlement aux conférences, un cours pour débutants français et étrangers. Je pense que le prochain numéro de « Kulturaj Kajeroj » vous apportera des détails intéressants sur le déroulement du programme d'été.

Les travaux entrepris en novembre suivent leur petit bonhomme de chemin, avec la lenteur qui semble être de règle dans ce domaine. Nous espérons que nous aurons la possibilité de tout remettre en état pour Pâques et d'effacer les traces tenaces du passage du plâtrier. Un certain nombre de courts séjours étant annoncé pour avril, mai et juin, il est, en effet, nécessaire que tout soit en ordre à Pâques.

La préparation de l'Assemblée générale 1976 se poursuit. Il semble bien que l'estimation de bilan donnée à la réunion d'octobre du Conseil d'administration se confirme en grande partie. Tous les sociétaires recevront, en mars, le compte d'exploitation et le bilan et pourront juger.

P. BABIN.

LA REVUE

Le rappel inscrit sur la bande d'expédition des précédents numéro de « Kulturaj Kajeroj » nous a valu quelques protestations amicales. Bien sûr il peut parfois y avoir une erreur dans notre fichier. Mais cela est rare. Les causes de « conflit » sont, en général : le fait que l'abonnement ne part pas du jour de la réception de la cotisation, mais du 1er janvier au 31 décembre de l'année, du numéro 1 au numéro 6 de la revue. Pour cette raison, nous envoyons les numéros précédemment parus. Une autre cause est le fait que nous avons jusqu'à maintenant continué à faire le service de la revue pendant un an et plus, même en cas de non-paiement, pensant que les quelques abonnés concernés étaient simplement en retard, puisqu'ils ne faisaient pas connaître leur intention de résilier leur abonnement. Par exemple, un abonné n'ayant pas réglé l'année 1970 recevait un rappel en 1971, mais, même en cas de non paiement, continuait à recevoir la revue en 1971, puis un nouveau rappel en 1972. Mais il est évident qu'un paiement fait à ce moment-là réglait pour nous la situation de 1970, mais par celle de 1971.

Que les amis qui n'ont pas très bien compris le rappel qui leur était fait sachent que le prix de l'édition ne nous permet plus de servir la revue gratuitement pendant un an, et que certains « décalages » parfois de deux ans datent de dix ans. Les circonstances nous obligent à essayer de remettre de l'ordre. Nous nous excusons auprès de ceux pour lesquels nous avons pu faire une erreur ; nous remerçions tous ceux qui se sont mis en règle.

NOS JOIES

Fabien Lahaye vient d'avoir une petite sœur, Karine. Aux parents, aux grands-parents Henriette et Pierre Fort, nous présentons tous nos compliments.

NOS PEINES

M. Guyot, père de Mme Babin, est décédé au début de cette année. Que M. et Mme Babin soient assurés que tous leurs amis partagent leur chagrin.

Une lettre de nos amis Serre, de Perpignan, nous a fait part du décès de leur fille Sylvie, à l'âge de 23 ans. Nous sommes certain que tous leurs amis seront aussi douloureusement frappés que nous. Nous assurons les parents de Sylvie de notre grande sympathie.

Le groupe de Saint-Etienne a perdu en deux mois son président d'honneur, Francisque Vérot, qui, malgré son grand âge, était encore, il y a peu de temps, l'hôte de Grésillon et des congrès ; et M. Rival, son toujours très actif président. Que leurs familles et leurs amis sachent que nous partageons leur peine.

ABONNEMENTS BIENFAITEURS (suite)

1974 :

B. Grampp (67) 30,00
R. Colney (05) 25,00
M. Ferrut (25) 30,00
L. Durand (09) 20,00

1975 :

P. Poulin (62) 30,00
J. Michau (45) 30,00
Club Saint-Etienne (42) 50,00
C. Rouquet (14) 30,00
H. Panche (Pologne) 30,00
R. Benazet (66) 30,00
J. Lezan (24) 30,00
M. Mouveaux (59) 30,00
H. Coulon (25) 30,00
Groupe Tours (37) 50,00
J. Fourreau (69) 30,00
G. Odent (62) 25,00
G. Prigent (84) 25,00
H. Karlsson (Suède) 30,00
D. Bettmann (75) 30,00
A. Stutzman (68) 25,00
G. Gerrier (75) 30,00
L. Durand (09) 20,00
A. Gaudry (92) 30,00
A. Fauvel (22) 25,00
J. Orti (94) 25,00
N. Peltier (76) 25,00
M. Coussé (72) 30,00
M. Desnos (53) 30,00
F. Jacquesson (86) 25,00
J. Trésorier (58) 25,00
P. Askolovitch (75) 50,00
G. Offroy (57) 25,00
A. Debertonne (78) 30,00
R. Olivaux (44) 30,00
L. Peraire (33) 30,00
C. Llech-Walter (66) 30,00
R. Llech-Walter (66) 30,00
M. Ferrut (25) 30,00

1976 :

J. Comadran (04) 50,00
F. Herbst (All. Féd.) 50,00
M. Granier (38) 30,00
C. Suchareau (75) 30,00
Club Saint-Etienne (42) 50,00
C. Rouquet (14) 30,00
A. Hervouet (92) 30,00
J. Claitte (69) 30,00
P. Bourquin (25) 30,00
S. Villemin (30) 30,00
C. Duflot (59) 30,00
J. Rousseau (75) 30,00
M. Mouveaux (59) 30,00
A. Horault (49) 30,00
L. Mee (Pays-Bas) 30,00
E. Noel (76) 50,00
G. Drezet (25) 30,00
K. Schönrich (All. Féd.) 90,00
G. Martinez (16) 30,00
R. Revendeville (59) 30,00
J.-P. Saint-Marc (61) 30,00
F. Cherault (33) 35,00
P. Boissou (75) 30,00
S. Humm (84) 30,00
R. Laffargue (33) 30,00
S. Guillot (74) 100,00
M. Sueur (62) 30,00
G. Dieusaert (92) 30,00
M. Ligot (22) 30,00
M. Gucz (Pologne) 30,00
J. Schrapp (All. Féd.) 30,00
B. Babin (56) 30,00
L. Chasseriaud (17) 30,00
J. Nagy (Hongrie) 30,00
G. Eussautier (69) 30,00
M. Soulisse (14) 30,00
D. Bourgeois (Suisse) 50,00
J. Benistant (72) 30,00
Club Retraités (72) 30,00
A. Gimbert (19) 30,00
G. Prévot (44) 30,00
D. Adnadj (Yougoslavie) 30,00
H. Genuit (10) 30,00
B. Quillaud (44) 30,00
A. Bourry (18) 30,00
S. Guillou (22) 30,00
R. Henaux (92) 50,00
R.-J. Marmou (77) 30,00
F. Rogers (Grande-Bret.) 30,00
M.-T. Lloancy (Tunisie) 30,00
P. Chatelus (69) 30,00
L. Durand (09) 35,00
P. Fort (10) 30,00
M. Leclercq (80) 50,00
R. Villegier (73) 30,00
P. Métivier (49) 30,00
M. Godart (49) 30,00
H. Ménard (44) 30,00
J. Derks (Monaco) 30,00
A. Masclet (06) 30,00
M. Bonafous (13) 30,00
Foyer Aix (13) 30,00
P. Lorenzin (13) 30,00
D. Jurquet (13) 30,00
C. Jurquet (13) 30,00
H. Bourdelon (13) 30,00
F. Cadenel (13) 30,00
P. Bariteaud (06) 30,00
A. Raulet (44) 30,00
P. Pallard (72) 30,00
M. Serre (66) 50,00
F. Bellon (06) 30,00
P. Cavelan (83) 30,00
P. Turbellier (44) 30,00
J. Trésorier (58) 30,00
P. Askolovitch (75) 50,00
G. Offroy (57) 30,00
R. Davoust (53) 30,00
B. Clavier (69) 30,00
J. Carré (69) 30,00
C. Martin (35) 30,00
A. Diez (34) 30,00
A. Capus (34) 30,00
M. Ferrut (25) 30,00
G. Gerrier (75) 30,00

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
(Fondateur : H. MICARD)
Château de Grésillon - 49150 BAUGÉ

C.C.P. : Nantes 1485 39
Téléphone : 34 à Baugé, ou Nantes (40) 76-77-95

PROGRAMME 1976
été

Première Période

Arrivée : **Vendredi 2 Juillet** — Départ : **Jeudi 22 Juillet**

SEMAINES CULTURELLES ESPERANTISTES

Programme :

9 h. 30 - 12 h. : Cours pour débutants, cours pratique, cours supérieur.
14 h. - 16 h. : Activités annexes : reliure, vannerie, etc.
18 h. - 19 h. : Conversation.
21 h. : Distractions diverses.

Vendredi 2 Juillet : 21 h. : « Faisons connaissance ».
Au cours de cette période : rencontre d'enseignants espérantistes.
Examens : Mercredi 21 Juillet.
Excursions : 7 et 16 Juillet.

Deuxième Période

Arrivée : **Vendredi 23 Juillet** — Départ : **Jeudi 12 Août**

SEMAINES INTERNATIONALES

Cycles de conférences sur des thèmes variés — Excursions

Programme :

10 h. : Conférences — Cours d'Espéranto (méthode directe).
14 h. : Activités annexes : reliure, vannerie, etc.
17 h. : Discussions sur les conférences.
21 h. : Distractions diverses.

Vendredi 23 Juillet : 21 h. : « Faisons connaissance ».
Excursions : 28 Juillet et 4 Août.

Troisième Période

Arrivée : **Vendredi 13 Août** — Départ : **Jeudi 2 Septembre**

SEMAINES D'ETUDE

Programme identique à celui de la première période

Vendredi 13 Août : 21 h. : « Faisons connaissance ».
Excursions : 18 et 25 Août.

Retenez vos chambres à l'avance.

Renseignements et inscriptions :
MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
Château de Grésillon - 49150 BAUGE

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon :	
noires :	0,50 F.
couleur :	0,70 F.
Cuillères de collection :	12,00 F.
Pendentifs :	12,00 F.
Disques de stationnement :	4,00 F.
Etoiles pour vitres de voitures :	2,00 F.

Pensez à acheter :

FALSAJ AMIKOJ

en Esperanto

de R. Bernard et A. Ribot

3,50 F. (+ port : 4,45 F.)

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 40,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

Commandez-nous

AMUZAJ DIALOGOJ

Modela Prononco

de la interlingvo Esperanto

10 F. + port

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude

Vos dictionnaires

Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

à M. CIRET

« La Timeraie »

VIEIL-BAUGÉ - 49150 BAUGÉ

Etablir les chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE

C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 20 Fr.

Demandez notre catalogue

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ

de P. Babin

Prix : 10,00 Fr.